

ROMANO FRENKEL.

## “VERDAJ FAJREROJ”

KOLEKTO DA VERSAĴOJ.

*AL VERDA STELO — ETERNA FIDELO.*

PREZO: 40 Spesdekoj = 1.00 franko = 80 pfenigoj.

AL LA MEMORO

DE MIA ĴUS MORTINTA DE NEKONATA

KRIMA MANO,

KARA, NEFORGESEBLA EDZINO

MI DEDIĈAS ĈI-TIUN VERKETON.

LA AŬTORO.

12, VI, 1908.

Nur antaŭ apenaŭ dek jaroj Sub la fianĉina vualo, Kun flora ornamo en haroj Ŝi  
staris kun mi ĉe altaro;

Kaj estis senvivaj la floroj Faritaj per manoj de l' homo, Sed ĝojis en ni niaj  
koroj Malgraŭ de la vintra malvarmo....

Kaj nun post apenaŭ dek jaroj Kaj preskaŭ en sama ornamo Kun floroj  
vivplenaj en haroj Revenis ŝi al la altaro;

Per volo mistera de l' sortoŜi kuŝis malviva en ĉerko,Kaj ploris mi, ploris  
senforta,Sed ĝojis la verdo de majo...

12. VI. 1908.

## **KREDU!...**

Kiam bruas la mar', kiam batas la ond',Kiam ĝemas ventego terura, —Kredu:  
venos la hor' — trankviliĝos la mond',Glata estos la maro lazura.

Kiam ploras l' anim', kiam premas dolor',Kiam ĉia forestas espero, —Kredu:  
venos la hor' — kaj paciĝos la kor',Via tute foriĝos sufero!

4, VII, 1905.

## **DU MINIATUROJ POR ENMUZIKIGO.**

(Dediĉitaĵ al S<sup>o</sup> J. Rozits).

1.

Ĉarmega nokt'... briletas lun'...Trilkantas najtingalo...Ho for, dolor'! Ripozu  
kor'Por taga vivbatalo!

2.

De arba juna folieto al ekflorinta floroRosguto falis: ĉu estas ĝi saluto  
gaja,Feliĉdezira al naskito maja —Ĉu pri baldaŭa florpereo antaŭsenta  
ploro?!...

VI, 1907.

## **AL ŜI.**

Ho, jes! Mi amas vin:Do kial ĉiam duboj?Belega sur fruntet'Do kial ĉiam  
nuboj?

Rigardu, ho anĝel':Ĉirkaŭe reĝas gajo!Ĉu estas la natur'Alia dum la Majo?

Ĉu estas mia sent'Alia ol la ama:Ĉar estas la belec'Kaj vi — afero sama!?

Se eĉ ne amus mi, Ridet' malgaja sole  
Sur via vizaĝet' Amigus min nevole.

19, XI, 1907.

Ne povas ĉiam nubo griza Bar' esti al sunlumo: Ĝi devas: ĉu sur teron fali  
Per fulmotondra pluvo, Ĉu malaperi, kiel fumo, Venkita de sunvarmo.

9. VI. 1907.

## **AL SIRIUS'O.**

Ho sankta stel' de Egiptuj' antikva, Plej bela stel' sur vintra la ĉiel',  
Dum la malvarm' de longa frosta nokto Vi memorigas pri eterna cel'!  
Ĉirkaŭe — neĝ', ĉirkaŭe — rigideco En la silent' profunda de l' natur', —  
Sed ĉarme vi radias, stelo suda: Kaj scias mi, ke ĉio dormas nur;  
Ke estas land' en kiu ĉielmeze Vi brilas al ĉiamevarma ter'.  
Kaj sentas mi: ekzistas font' eterna De l' am' de bel' de l' vivo kaj esper'!

9, VI, 1907.

## **ANKAŬ...**

Ankaŭ dum vintro frostega Troviĝas birdet', kiu trilas; Ankaŭ dum nokto  
malhela Troviĝas stelet', kiu brilas!

Inter la nuboj grizegaj Ankaŭ traĝas la suno; Portas venteto la suda  
Varmon eĉ dum la aŭtuno!

Ankaŭ en mond' egoista Troviĝas la kor', kiu amas; Ankaŭ dum hor' de l'  
mizero Konsolas esper', kiu flamas.

## **KANTO SOMERA.**

Pasie tremetas varmega aero La teron ĉiel' ĉirkaŭprenas,  
En brila ornamo Ĝi svenas de l' amo, Kaj kreas la Forto-Mistero!

Kaj estas venkita la morta fantomo, Ĉirkaŭe la vivo festenas,  
Kaj ĉio obeas Al Fort', kiu kreas Por cel' nekonata al homo!

6, V, 1908.

## KANTO AŬTUNA.

Jam spiras aŭtuno Per sia malvarmo kruela; Malgaje, malbrile rigardas la suno  
Kaj ploras pluvanta ĉielo...

Kaj ĉiam minace Alrampas grizegaj la nuboj; De pensoj malgajaj jam estas mi laca,  
Penetras animon la duboj...

6. V. 1908.

## VINTRA KANTETO.

Tuta vestis sin ter' per mantelo, Pli brila, ol blanka lili'; Kiel plej pitoreska juvelo  
Radias arbar' sen foli'.

Kiel kron' diamanta de l' reĝo, De l' suno sub hela radi' Brilas ĝia ornamo el neĝo;  
Glorkantas la kor' al la Di',

Ĉar mi sentas Lin en la aero, En frosta vigliga ventet' Kaj en ĉiu glacia larmero,  
En gaja pasera kantet'.

11. III. 1908.

## KANTETO PRINTEMPA.

De tago al tago Jam pli kaj pli varma Fariĝas la suno, kaj ĉarma; Glacio sur lago  
Nun jam ekdegelas, La vintron printempo forpelas. Al mia orelo Arbar' el apuda  
Alflugas kaj kantas vent' suda: Pri bono kaj belo, Pri am' kaj espero, Pri baldaŭ venonta somero;  
Kaj, kiel kis' dolĉa De ĉarma knabino, De l' sud' malproksima filino, Kares' per ensorĉa  
En mian animon Ĝi verŝas feliĉon senliman.

21. I. 1908.

## LA ROSERO

(Varianto).

De ametrema kverkfolio juna Ekfalas al floranta violfloro Ĉarma Da ros' brilanta ero...  
Ĉu ĝojo estas ĝi pri amo nuna Ĉu pri baldaŭa florpereo ploro Larma De kora malespero?

3. V. 1908.

## **LA LILIO.**

En ombra varmet' de tilio, Kun plora malĝoj', sub foli' Sopiras pri suno lilio —  
Petplendas al la papili':

«Ho, kara flirtul' de l' aero, —«De l' kampo verdeta sur ter'«Floretas sen ia  
sufero«Lilio en plena liber';

«Kisetas ĝin suno karese,«Ĝi svenas en ama forges',«Kaj kantas ĝi dolĉe,  
senĉese«Kun ame-ebria ekspres'.

«Rakontu do, ho papilio,«Al tiu feliĉa lili'«Ke ploras mi sub la folio«En ombro  
de granda tili'.

6. III. 1908.

## **LA ŜAŬMO DE L' ONDO.**

La reĝo de l' tago, en togo purpuraJam finis iradon ĉielanKaj laca baniĝis en  
akvo lazuraVerŝante la lumon ruĝhelan;

La mano en mano, ni sidis trankvileSur bordo de l' maro kvieta,Al ŝiaj koralaj  
lipetoj simileRuĝetis nubeto strieta...

Subite alkuris la ond' diafanaKaj bordon kun am' ĉirkaŭprenis, —Sed ĝia sopir'  
al feliĉ' estis vana:De l' forta ekbato ĝi svenis.

Kaj mortis la ondo, nur ŝaŭmo neĝbrilaPerliĝis en ruĝ' de l' vespero;La lastan  
saluton venteto facilaAlportis de l' sun' al la tero.

Kaj jen malaperis la ŝaŭmo ruĝpalaKun ĝema plaŭdson' de pasio;De l' suno,  
droninta en akvo kristala,Trakuris la lasta radio.

Ho, ĉu ne simile al ŝaŭmo de l' ondoPasi' malaperis de l' amo?!Nun sola,  
solega mi restis en mondo,Finbrulas de l' viv' mia flamo...

20. I. 1908.

## **«AL VERDA STELO — ETERNA FIDELO»**

### **1. LA KORO FIDELO.**

Sincera fervoroFidela de koroPli bone, ol oro,Nin helpas atingi la celon!En ĉia danĝeroLa sankta espero,Pli forta, ol fero,Nin helpas konservi fidelon!

24. I. 1908.

## **2. DEZIRU — VI POVOS!**

Se dum la bataloPor la idealoLaciĝis labori vi sola,Kaj se el la koroForflugis fervoro —Por helpo kaj vorto konsolaNur serĉu amikon —Vi trovos!

Se cel' estas belaKaj koro fidela,Se vojon nur rektan vi iros,Se nur vi ne cedos,Kuraĝon posedos,Ĝis lastan vi spiron elspiros —Deziru nur venki —Vi povos!

II. 1908.

## **3. AL EDZO FIDELA.**

Ĉu vi memoras, kiel unufojeVi ĵuris al la amatino?Ĉu vi forgesis, kiel gaje, ĝojePromesis amon vi sen fino?

La blua maro estis atestantoDe via vort' sincera, ĵura!Aŭ ĉu ne sonis sankta himno-kantoAl via am' ĉielepura?

Ĉu vi memoras, kiel venis tagoDe la renkonto via dua?Ĉu inter montoj ĉe lazura lagoNe sonis via ĵuro plua?

Ĉu vi forgesis, kiel trans la maroĈe la altar' de majstroj famaKuniĝis vi, mirinde bela paro,Por amo kaj fidel' ĉiama.

Kaj nun parencoj viaj vin admonas,Ke vi forlasu la edzinon;Al la orel' delogaj vortoj sonas:«Jen vidu veran belulinon!

«Ne estas ĵur' deviga kaj sufiĉa,«Malbona estis la elekto —«Nur kun alia estos vi feliĉa:«Beleco mem — ŝi, kaj perfekto!

Ĉu restos, diru, io pensŝancelaEn la amanta via koro?Ho, diru tuj, ĉu restos vi fidelaDum la danĝera nuna horo?

*Dum la Kristnaska nokto 1907. (maln. st.)*

## **4. BATALA KANTO.**

*Al nia glora armeestro, Th. Cart, dediĉas tiun-ĉi kanton lia sincera admiranto.*

Eksonu trumpetoj, ektondru tamburoj  
Kaj laŭte ekkantu, armeo! Kun kant' tiu  
ĵetu vin kontraŭ la muroj — Atendas vin glora trofeo!

Vi ĵuris batali, vi ĵuris labori: Nun venis la hor' de l' batalo! Ĉu igos malĝoji, ĉu  
igos vin plori Unua ekbat' de l' fatalo?!

Glor' al batalintoj unua de horo! Imitu ekzemplon ilian: Kun kredo en koro, kun  
ega fervoro Vi montru kuraĝon eĉ plian.

Ho, ekrememoru, kioman nun fojon Vi ĵuras: «Ni restos fidelaj!» Al vi nia  
Majstro ĵus montris la vojon, Do for, malamikoj ribelaj!

Kaj jam armeestro trumpetas atakon, Komandas al siaj soldatoj: Kuraĝe  
antaŭen, forpeli la drakon De viaj plej sanktaj Penatoj! Do for la ŝanceloj, do  
for ĉiuj duboj! Leviĝu la verda standardo! Ekbrilos la suno, disiĝos la  
nuboj; Antaŭen do la avangardo!

Kaj post l' avangardo, kun ĝoja spirito, Sin ĵetu la tuta armeo Kun krioj de  
venko, kun kant' de l' milito — Atendas ĝin glora trofeo!

6, IV. 1908.

## **Al la gazeto «BRAZILA ESPERANTISTO»**

(okaze de ĝia apero).

Se povus la sento, Simile al vento, Flugi mistera kun forto;

Se tra la aero Tra tuta la tero Povus sin porti kantvorto;

Se estus nur kordo Son' kies el nordo Povus atingi la sudon —

Al nova standardo Mallerta mi bardo Sendus glorkanton kaj ludon!

Sed falis la baro Dum longa jararo Senton tuthoman kaŝanta;

Ekzistas nun kordo De l' kor', en agordo Kor' kun tutmonda, sonanta.

Ekzistas jam vorto, Sonanta kun forto, Aŭdas ĝin tuta homaro:

Per vort' esperanta Saluto glorkantalru en landon trans maro!

El land' malvarmega Al lando varmega, Flugu al bordoj Brazilaj,

En lando varmegaKaj en malvarmegaKoroj ĉar estas similaj —  
Por tion ekkoniNur devas eksoniLingvo komuna en mondo...  
Sed nun ĝi jam sonasKaj homojn admonasVivi amika en rondo —  
Kaj tial la sentoSimile al ventoFlugas mistera kun forto  
Kaj tra la aeroTra tuta la teroPortiĝas mia kantvorto —  
Kaj tial la kordoDe l' koro en nordoSonas amike al sudon,  
Al nova standardoMallerta mi bardoSendas glorkanton kaj ludon!

3. VI. 1907.

## **TRADUKAĴOJ EL LA LATVA LINGVO**

La sekvantajn du tradukaĵojn mi dediĉas al mia amiko S<sup>ro</sup> J. Rozits, kiu helpis al mi la tradukadon el la tute nekonata de mi lingvo latva.

### **1. PRINTEMPO DE L' AMO.**

De latva poetino Aspazia.

Per trisuna varmo,Per triventa blov'Tuŝita neĝ' en flirta mov'!Dum via pas',  
dum via pas'Hirundoj flugas en amas';Premride batas kor' sen las'Dum via  
pas', dum via pas';Tremetas kor' dum via pas'!

3, V. 1907.

### **2. SUB VERDA LAŬBO.**

De latva poeto J. Rainis.

Sin fermas malrapide vund':Ĝi longe, forte doloretisDum longaj jaroj vanaj...Mi  
ŝian blankan manon petis —Ŝi ĝin al kor' tremanta metis:Fajreras ree pens';  
en fund'De l' kor' jam forgesita — vund'.Ripozu koro!Voj' via — longa;Baldaŭ  
vekos vin hor' de laboro!

7. VI. 1907.



## ORO KAJ ŜTALO.

El Puŝkin.

Ĉio — mia! diris oroĈio — mia! diris ŝtal'. Mi aĉetos! diris oroKaj mi prenos!  
diris ŝtal'.

9. VI. 1907.

## HISPANA ROMANCO.

El Puŝkin.

En noktzeŝir' — De l' vento ir'. Kun bru' De l' flu' — Gvadalkvivor' [\[1\]](#).

Jen sin levis luno hela... Aŭdu!... ĉu... gitara son'? Jen la hispanino bela Sin  
apogis sur balkon'.

En noktzeŝir' De l' vento ir'. Kun bru' De l' flu' — Gvadalkvivor'.

For mantel', anĝelo vera, Kaj aperu, ho sunet'! Tra la balustrado fera El ŝoviĝu,  
piedet'!

En noktzeŝir' — De l' vento ir'. Kun bru' De l' flu' — Gvadalkvivor'.

11. VI. 1905.

[\[1\]](#) «Gvadalkvivor» — konata rivero en Hispanujo.

## LULKANTO.

Laŭ A. Kruglov.

Ĉarme sonas lula kant', Movas sin lulilo; Dolĉe kantas la patrin' Al malgranda  
filo:

«Dormu, kara, ho anĝel', «Griza kolombeto, «Matenruĝa mia stel', «Kampa  
belfloreto!

Ĉarme sonas lula kant' Lumas lun' sen fino... Kia estos la respond' Fila al  
patrino?

1. VI. 1907.

## EL LERMONTOV.

Ĉe sanktloĝej', ĉe la pordeg'Almozon petis vir' staranta, Senforta kaj pro malsateg', Pro la soifo suferanta.

Peceton nur ja da la pan'Turmenta kun rigard' li petis!...Kaj iu ŝtonon en la man', De la petanto tiu metis!

Petegis tiel ankaŭ miKun larmoj kaj kun la turmentoLa amon vian... kaj de viTrompita estis mia sento.

11. VI. 1905.

## SONĜO.

El Lermontov.

En sunvarmeg', en valo DagestanaKun plumb' en brust' senmova kuŝis mi; Ankoraŭ fumetadis vund' malsana, Po gutoj fluetadis sang' el ĝi.

Mi kuŝis sola sur la sablo vala, Ŝtonegoj staris en malvasta form'; Sun' min kaj ilin per varmeg' egalaBruligis; mortprofunda estis dorm'.

Festen' sonĝiĝas al mi, briligitaPer fajroj, en la hejma mia land'; Pri mi parolas oni en kronitaVirina ar' el floroj per girland'.

De gaja la parol' en malproksimoEnpense tie sola sidas ŝi, En la malgaja sonĝo la animoTrempe, sed pri kio? — scias Di'!

Kaj sonĝas ŝi: Jen valo Dagestana, Jen malvivulo kuŝas en kviet'; En lia brust' nigretas vund' malsana, Eliras sang', malvarma per fluet'.

12. VIII. 1905.

## EL NEKRASOV.

Ne pri amik' ĉe mortofer'Domaĝas mi dum hor' batala. Nek pri edzina larmsufer'Aŭ de l' hero' pri mort' fatala: Por edzinplor', ve, estos lim', Amik' plej bona lin forgesos; Sed estas ie la anim' — Ĝis tomb' memoron ĝi karesos. En hipokrita homa rond'Mez' la kolero kaj malbenoKaj inter larmoj de la mond'Sincera estas sole jeno: Pri sia id' patrina plor'Ĉar ne forgesos ŝia

kor', Se morton sangan filo trovos, —Kiele plorsalik' ne povos  
Surlevi branĉojn eĉ por hor'!

9. V. 1908.

## **EL A. TOLSTOJ.**

Okaze, dum bala vespero  
Mi vin mez' de brua vantec'  
Ekvidis, — sed kovris  
mistero  
La trajtojn de via belec'.

Malgaj' sur okuloj — senlima,  
Belsonis la voĉ' sen kompar',  
Son' kvazaŭ de ŝalm'  
malproksima  
Aŭ mara ludanta ondar'.

Min ĉarmis talio gracia  
Kaj via enpenso elvid';  
Malgaje el koro pasia  
Sonoras en mi via rid'.

Se, laca, mi serĉas trankvilon  
Dum nokta silento, en sol', —  
Mi vidas malgajan  
pupilon,  
Aŭdiĝas la gaja parol'.

En sonĝo malĝojo sin plias,  
Sin trudas la revoj sen ĉes'...  
Ĉu amas mi vin, mi ne scias —  
Al mi tamen ŝajnas, ke jes!

7. IV. 1908.

## **LA MAŬRINO.**

De Ĵadovskij (el rusa lingvo).

Kiel fajro — kisoj miaj,  
La tali' — fleksebla kan';  
Iĝos for suferoj viaj:  
De brust' mia venas san'.

Kiel plumb' fandita, bolas  
Sang' en vejnoj kaj en kor';  
Amvenenon kiu volas, —  
Kaptu kronon mian for!

De l' dezerto bruligeca  
Flor' aroma estas mi,  
Sed trunk' — dorna, veneneca  
Kaj danĝera — la foli';

Amas mi, kaj mi perfidas,  
Sed min sekvas granda ar';  
Ĵetas kisojn mi kaj ridas,  
—Kaj malpac' — ilia far'.

Se vort' mia nur eksonus,  
Tuj ekfluus sangriver';  
Sed fajreron aman donus  
Mi al ĉiu sur la ter'.

31. V. 1908.

## **EL HEINE.**

1.

Ne amas vi, ne amas vi —Malĝojas mi neniel:Ĉar se nur vin rigardas mi,Mi  
ĝojas, reĝo kiel!

Eĉ pri malam' la ruĝbuŝet'Parolas ĉiam via —Ho, donu ĝin nur post  
kiset':Konsol' tuj venos mia!

2.

Timetas lotosfloroLuksbrilon de la sun',Kapeton sian klinasKaj revas pri la lun'.  
Amanto ĝia lunoĜin vekas per radi',Vizaĝon virgan turnasKun am' la flor' al ĝi.  
Kaj mute ardas, lumasAl la ĉiel' la flor',Aromas ĝi kaj plorasPro am' kaj  
amdolor'.

9. V. 1908.

3.

En verdo la ter' dolĉe svenas,Sonoras alaŭda la tril' —Printemp' bonodora  
alvenasKun lumo, koloroj kaj bril'

De kanto alaŭda moliĝasLa froste rigida humor',Plendkanto ĉielen leviĝasEl  
mia malgaja la kor'.

Kaj trilas l' alaŭd' delikate:«Pri kio de l' kanto sopir'?» —Ĝin kantis mi, ho  
plejamataDum longa de jaroj pasir'!

Mi kantis ĝin, mia etulo,Dum koron premegis ĉagren',Al av' jam — de vi  
antaŭulo,De verda arbar' en solen'.

5. III. 1908.

## **NERIKOLTITA TERSTRIO.**

El Nekrasov.

Venis aŭtuno. Arbar' senvestiĝis, Flugis for birdoj, la kampoj nudiĝis;  
Restis kun greno jam unu nur stri' —Kaŭzas ĝi penson malgajan al ni!  
Ŝajnas, ke spikoj direktas tra l' vento:«Premas malĝoja aŭtuna nin sento:  
«Tedis kliniĝi al ni ĝis la ter' —«Grasa baniĝas, en polvo, grener'!  
«Bird' nin difektas dum sia trapaso,«Tute malsata, en granda amaso,  
«Batas venteg' nin, mordetas lepor'...«Kial prokraste la mastr' estas for?  
«Ĉu ni ne kiel ceteraj naskiĝis?«Ĉu ni malbone el floroj spikiĝis?  
«Same bonega, matura por pren'«Nia delonge ŝveliĝis ja gren'.  
«Ĉu do por tio li semus kaj plugus,«Ke ni kun vento aŭtuna disflugus?...  
Venas de l' vento malĝoja redir':— Nun de l' malsano ekkaptis lin spir'.Bone li  
sciis por kio li semis,Sed malfacila laboro lin premis:  
La mizerul' jam ne manĝas, dolor' —Verm' malsaniga — suĉegas en kor';  
Man' vin seminta, vip' kvazaŭ je l' tero,Pendas, sekega, kiele lignero;  
Voĉ' malaperis, malbrilas pupil',Kaj plu ne sonos post akra plugil'  
Bela, enpena, malgaja la kanto,Kiun kantadis mizera pluganto!

2. I. 1908.

## **KANT' PRI SORĈPOVA OLEG'O.**

DE A. PUŜKIN.

ANTAŬPAROLO DE LA TRADUKINTO.

Oleg'o estas la unua Kiev'a princo el la dinastio de Rjurikidoj. La rusa kroniko rakontas, ke princo Rjurik mortante transdonis la tronon al sia parenco Oleg', ĉar Igorj, la filo de Rjurik estis ankoraŭ neplenaĝa. Oleg'o submetis al sia potenco la urbon Kiev, kuŝantan ĉe la dekstra bordo de l' rivero Dnjepr kaj en la jaro 883 p. K. preskaŭ ĉiujn slavajn popolojn, loĝintajn apud Dnjepr'o.

Farinte Kiev'on sia ĉefurbo Oleg' diris: «Estu ĝi la patrino de rusaj urboj». En la jaro 907, lasinte en Kiev Igor'on, Oleg' ekiris batali kontraŭ la grekoj kun militistaro el slavoj kaj skandinavo. Oni iris sur ĉevaloj kaj sur ŝipoj. Laŭ la vortoj de la kroniko estis 2000 ŝipoj po 40 homoj en ĉiu. Legendo diras, ke Oleg' venkinte la grekojn kaj pendiginte sur la pordego de Konstantinopolo (kiun la rusoj nomas ankaŭ «Car-Grad'» = «Reĝo-Urbo») sian ŝildon kaj la ŝildojn de siaj militistoj kiel signon de la venko, reiris hejmen kun riĉegaj donacoj, ricevita de la grekoj. La rusa popolo, mirigita de liaj sukcesoj nomis lin «Sorĉpova».

*Olga* (Oljga) — estas nomo de la edzino de l' princo Igor (Igorj).

*Ĥozaroj* — estis popolo loĝinta en la suda Rusujo, pri kiu la historiistoj ne estas inter si konsentaj, ĉu ili estis hungaroj, ĉu finoj, ĉu ia alia popolo, kaj kiuj ofte atakadis la slavajn gentojn.

*Peruno* — estas la ĉefa idolo de la antikvaj slavoj.

---

Pri la morto de Oleg'o la rusa kroniko rakontas legendon, kiun la fama rusa poeto Puŝkin prenis kiel temon por la sekvanta balado.

## **KANT' PRI SORĈPOVA OLEG'O.**

Balado de A. PUŜKIN.

Jen kiel intencas sorĉpova Oleg' Nun venĝi malsaĝajn Ĥozarojn: Atak' pro ilia per glav' kaj flameg' Detrui vilaĝojn, kamparojn. Kun la kolegar', en armaĵo, sur val' Princ' rajdas sur sia fidela ĉeval'.

Arbar' el malluma renkonte al li Saĝega jen iras sorĉanto — Humila nur antaŭ Peruno — la di', De la estontec' sciiganto; Nur lia afer': antaŭdir' kaj preĝeg'; Al saĝmaljunulo alrajdis Oleg'.

— «Ho, diru, sorĉisto, amat' de di' Viv' kion por mi do pretigos; Je ĝojo ĉu de malamika najbar' Tombtero min baldaŭ kuŝigos? Malkaŝu la veron sen timo je mi, Plej bonan ĉevalon mi donos al vi». —

— «Sorĉistoj ne timas potencon de rang', Donacon de princ' ne bezonas; Profeta libera ilia la lang' Per volo ĉiela nur sonas. Kaŝiĝas profunde estonta la sort', Sed vidas mi ĝin, mia vera — la vort',

Sur frunto. Ho, princ', tenu ĝin en memor':La glor' al venkinto — ĝojego!Nom' via famiĝis per venka honor':Car-Grada sur fama pordego —Ŝild' via; kaj akvo, kaj ter', ĉia fort'Obeas al vi, ho mirinda jen sort'!

De ondo trompema en blua la mar'En hor' de ventego fatalaNe ĉesos la fluo de via jarar',Nek ankaŭ de sago batala;La batojn forŝirmos armaĵa persist'Ĉar la nevidebla vin servas gardist'.

Ne vian ĉevalon timigas danĝer',Al via obeas ĝi volo;Ne tremas ĝi en la batala afer'La sagoj fajfante ĉe kolo.Nenio por ĝi — ĉu malvarm', ĉu batal' —Sed morton vi havos de via ĉeval'.»

Ekridis Olego, sed tuj post moment'Kovriĝis vizaĝ' per malhelo.Ĉeval' forlasite en pens' kaj silent',La man' apogite sur selo,Amikon fidelan per mano kun mol'Karesas, frapetas li kruta je kol'.

«Adiaŭ, kolego, fidela servant',Disiĝi por ni venis horo,Ripozu, neniam plu tuŝos rajdant'De vi piedingon el oro.Adiaŭ, ho kara, memoru do min.Amikoj — junuloj nun prenu vi ĝin!

Tapiŝ' per haraĵa ĝin kovru kun pen',En mian herbejon irigu,Banigu kaj nutru plej bona per gren',Per akvo el fonto trinkigu».Junuloj kondukis ĝin tuj al la stal'Por princo jam preta alia ĉeval'.

---

Festenas Olego kaj la kolegar'Kun gaja sonoro pokala;Kaj blanka jam estas ilia buklar',Sur mont' kiel neĝo kristala.Pri tagoj pasintaj — ilia parol',Pri kunaj bataloj rakontas popol'.

«Sed kie do estas nun mia koleg',«Ĉeval' mia forta, flamema?«Ĉu sana?» — demandis la princo Oleg',«Ĉu same rapida, ludema?»— «Ho, princ', ĝi ne estas jam plu en la mond',«Ĝi dormas sur mont'.» — tia estis respond'.

— Mallevis la kapon Oleg'-potencul',Kaj pensis: «Do kio — sorĉado?«Sorĉist', vi mensogis, ho vi, frenezul'!«Ne estus se antaŭdirado,«Ĝis nune ĉeval' mia portus ja min.» —La ostojn ekvidi — de l' princo inklin'.

Jen rajdas potenca Oleg' el la kort'Kun Igor, maljunaj kun gastoj.Sur kruta monteto, de Dnepro ĉe bord'La ostoj jen kuŝas nur lastaj.Kaj pluvon, kaj polvon portant' en silent'Nur ŝtipon mez' ili ŝancelas la vent'.

Surpaŝis la princ' sur ĉevalan krani'Kaj diris: «Amiko modesta,Ve, vivas la mastro pli longe ol vi:En mia proksima mortfestoNe via, fluante kolhara de vil',Sang' tombon varmigos sub akra hakil'.

Jen kie sin kaŝas perejo por mi —Min osto je mort' minacadis!...»Sed dume serpent' el la morta krani'Siblante al li elrampadisVindante piedon per nigra ruband' —Ekkriis pikite la princ' de Rusland'...

---

Dum festo post mort' de Olego pokal'Ŝaŭmante rondiras en ordo.Princ' Igor kaj Olga — sur monto; en val'Jen sidas kolegoj ĉe bordo,Kaj de batalintoj amika en rond'Batal' pri pasinta laŭtsonas rakont'.

20. I. 1906.

ENHAVO.

	<b>Paĝoj</b>
<a href="#"><u>Nur antaŭ apenaŭ dek jaroj</u></a>	4
<a href="#"><u>Kredu!</u></a>	5
<a href="#"><u>Du miniaturoj</u></a>	6
<a href="#"><u>Al ŝi</u></a>	7
<a href="#"><u>Ne povas ĉiam nubo griza</u></a>	8
<a href="#"><u>Al Siriuso</u></a>	9
<a href="#"><u>Ankaŭ</u></a>	10
<a href="#"><u>Kanto Somera</u></a>	11
<a href="#"><u>Kanto Aŭtuna</u></a>	12
<a href="#"><u>Vintra Kanteto</u></a>	13
<a href="#"><u>Kanteto Printempa</u></a>	14
<a href="#"><u>La Rosero</u></a>	15



<a href="#"><u>La Lilio</u></a>	16
<a href="#"><u>La Ŝaŭmo de l' ondo</u></a>	17
<b>«Al Verda Stelo — Eterna Fidelo»</b>	
<a href="#"><u>1. La Koro fidela</u></a>	18
<a href="#"><u>2. Deziru — vi povos</u></a>	18
<a href="#"><u>3. Al Edzo Fidela</u></a>	19
<a href="#"><u>4. Batala Kanto</u></a>	20
<a href="#"><u>Al «Brazila Esperantisto»</u></a>	22
<b>Tradukoj el la latva lingvo:</b>	
<a href="#"><u>1. Printempo de l' amo (Aspazia)</u></a>	24
<a href="#"><u>2. Sub verda laŭbo (Rainis)</u></a>	24
<a href="#"><u>Oro kaj ŝtalo (Puŝkin)</u></a>	25
<a href="#"><u>Hispana Romanco (Puŝkin)</u></a>	26
<a href="#"><u>Lulkanto (Kruglov)</u></a>	27
<a href="#"><u>Ĉe sanktloĝej' (Lermontov)</u></a>	28
<a href="#"><u>Sonĝo (Lermontov)</u></a>	29
<a href="#"><u>Ne pri amik'... (Nekrasov)</u></a>	30
<a href="#"><u>Okaze, dum bala vespero... (Grafo A. Tolstoj)</u></a>	31
<a href="#"><u>La Maŭrino</u></a>	32
<b>El Heine:</b>	
<a href="#"><u>1. Ne amas vi...</u></a>	33
<a href="#"><u>2. Timetas lotosfloro...</u></a>	33
<a href="#"><u>3. En verdo la ter' dolĉe svenas...</u></a>	34

<a href="#"><u>Nerikoltita terstrio (Nekrasov)</u></a>	35
<a href="#"><u>Kant' pri Sorĉpova Olego (Puŝkin)</u></a>	37

## ESPERANTISTA PRESEJO

DE A.-J. WITTERYCK

— Bruĝo, (Belgujo). —

### Notoj de transskribinto:

Mi aldonis mankitajn apostrofojn kaj ĝustigis kelkajn aliajn mispresaĵojn. Mi konservis la malsaman interpunkcion en la datolinioj. La poemo *Kant' pri Sorĉpova Olego* aperis en la originala libro plejparte sen spaco inter linioj. Mi apartigis la liniojn en strofojn laŭ la rusa originalo.

\*\*\* END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK "VERDAJ FAJREROJ": KOLEKTO DA  
VERSAĴOJ \*\*\*

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE